

Nia mondo – La planedo Tero



Rio de Janeiro 1992: Agendo 21

La pintokonferenco pri medio kaj evoluo
(en: UNCED, eo: UNKME)


prilaboris vojojn por solvi la plej urĝajn problemojn de
la homaro fronte al la 21-a jarcento:

- ekologiajn
- ekonomiajn
- socialajn

La Agendo 21 estis ratifita de 178 registaroj.

en: UNCED, United Nations Conference on Environment and Development
eo: UNKME, Unuiĝintaj Nacioj - Konferenco pri Medio kaj Evoluo

Homa Influo al la Akva Mondo



Klimato

Forceja efiko

Homaj aktivecoj

Efikoj

Fonto:
Philippe Rekacewicz,
UNEP/GRID-Arendal

Ni kaj la Akvo

Kia akvo

- Fluantaj akvoj
- Lagoj, maro
- Grundakvo (ne forpumpi)
- Pluvakvo (en la grundon)
- Trinkakvo (efike uzi)
- Malpurigitaj akvoj el domoj kaj fabrikoj
- Rubo, ĵetita en la naturon

Uzado, Efiko, Kvalito

- Akvoforto, transporto
- Poluado, trofiŝado
- Agrikulturo, industrio
- Uzi ĝin laŭeble
- Kontrolo de la kvalito
- Purigi, por ne polui la akvaron
- Poluas akvon, malsanigas bestojn (fiŝojn, birdojn)

Plastaĵoj en la akvo



Plastaĵoj el riveroj kaj ŝipoj naĝante kolektiĝas en la maroj.
The Great Pacific Garbage Dump Stretches From California to China
Foto el artikolo de Darcy Bonfils and Imaeyen Ibanga, ABC News, 2008-08-06

Malbonaj Sekvoj de nia Plasta Mondo !



Charles Moore:
Raporto pri grandega
plastaĵo-rubejo ene de la
Nord- Pacifika Kirlejo
Best Life Magazine
(2007-05-11)

Autoro: Susan Casey,
Fotoj: Gregg Segal
www.bestlifeonline.com/cms/publish/travel-leisure/

Environmental World
108 (2008) p.132-139
eldonejo: Elsevier



Nord- Pacifika kaj Globala Kirlejoj



Bildoj: algalita.org

Videblaj konsekvencoj: Testudo kun O-ringo



Granda Birdo = Rubujo ?



KAEST 2008 – Plastajhoj en la akvo (Westermayer/Niesert)

Ne-tuj-videblaj Sekvoj de nia Plasta Mondo !

- **Pecetoj**, fibretoj kaj polvo de plastaĵoj en la akvaro.
- **Kemiajxoj** el la plastaĵo:
 - moligenzoj, flamiĝ-reduktenzoj, surfacaĵoj) kiuj
 - akumuliĝas en la graso de la fiŝoj – kaj sekve de homoj, ursoj kaj birdoj (ktp.) - kaj
 - interagas kun la hormona sistemo.

Ne-tuj-videblaj Sekvoj de nia Plasta Mondo !

- * **PFOA** – Per-fluoro-oktan-acido (akvoresita kovraĵo k. kontraŭ altenigo, varmeg-resisto de plastaj ujo je rapid-kuirendaj manĝaĵoj → kancero).
- * **PBDE** – Poli-bromo-di-fenil-eteroj (flamiĝ-reduktenzoj → danĝera por hepato kaj tiroido).
- * **Ftalatoj** (moligenzoj → ksenohormono igas virajn mamulojn hermafroditaj).
- * **BPA** – Bisfenol A (lado-surfacaĵo → paralizo, prostato-kancero, obesito (grasiĝo))

Persist(ant)a: preskaŭ ne malkomprenebla en natura ĉirkaŭaĵo.
Kseno-hormono: artefarita substanco kiu agas kiel hormono.
-enz-: sufikso (neologisma), simile al – il-, sed por kemiaĵoj, k.s..

Ekzemplo de Ksenohormono: BPA

Bisfenol A, BPA, troviĝas en la plastikaĵo Polikarbonato, uzita por bebo-boteletoj, vazaro por mikro-onda forno, internaj kovriloj de ladskatoloj kaj KD-oj.

Ĝi agas en la animaloj (inkluzive de la homo) kiel ksenoestrogeno (inigas virojn) kaj ankaŭ same kiel natura t.n. endokrina substanco kiu informas la korpon pri malsateco; kaj fakte stimulas la troan manĝadon kaj grasiĝon.

BPA estas liberigita pere de acida nutraĵo kaj dum la varmigo de la ujo.

Do, prefere uzi vitrajn botelojn – des pli por beboj.

Greenpeace Magazin 6.08, p.58

Wikipedia: de.wikipedia.org/wiki/Bisphenol_A

Algalita Marine Research Foundation: algalita.org

Kion Faru NI MEM ?

- Uzi la akvon ŝpareme
- ✓ Aĉeti efikajn ilojn por provizi la akvon
- ✓ Kolekti pluv-akvon por la ĝardeno kaj necesejoj
- ✓ Uzi reciklitan paperon
- ✓ Eviti viŝtukojn el papero (savi pra-arbarojn)

- ✓ Ne forĵeti sed re-**Kolekti** foruzitajn plastaĵojn
- ✓ **Eviti plastaĵojn**, laŭeble uzi vitro-botelojn k. daŭrajn sakojn

- ✓ **Ne-naturajn ludilojn** prefere ne aĉeti – eĉ tute ne, se ili enhavas ne-kontrolitajn kemiaĵojn (moligenzoj, koloroj, stabiligenzoj, ??)

Kion Faru la Komunuma Administrejo ?

Organizi la **kolektadon de plasta rubo**

- por reciklado, aŭ
- kontrolita bruligado, uzante la energion por produkti kurenton kaj varmon.
- detruu neuzitajn medikamentojn (al bruligejo).

Kelkaj ret-ligoj

icpdr.org (en)	Int-a komm-o por protekti la Danubon
algalita.org (en)	Algalita, Oceana Esplor-Fonduso
mas-eo.org (eo)	Monda Asembleo Socia -> Medioprotekto
vorort.bund.net/suedlicher-oberrhein/downloads.php?id=41 (eo, k.a.)	BUND – Naturprotekta Asocio en Germanio
greenpeace.org (diversaj)	Internacia pagharo de Verdpaco
treffpunktfreiburg.de/agenda21/ lfu.baden-wuerttemberg.de iclei.org (en,es)	Agendo 21, Freiburg/Breisgau Federacia Instituto, 24 evoluo-indikatoj ICLEI: Internaciaj Urboj por Daŭripoveco
(en krampoj – la lingvo(j))	

Kion Faru la Ŝtatoj / EU ? Kemiaĵoj

Fari kaj apliki leĝojn por esplori la plastaĵojn k.a. kemiaĵojn laŭ ilia persisteco kaj minaco al la vivantaro (REACH) – aŭ permesi (limigite) aŭ malpermesi entute.

Kie troviĝas danĝeraj kemiaĵoj ?

- Moligenzoj k.a. en plastaj materialoj.
- Tegaĵoj de paperboteloj, ladskatoloj.
- Teksaĵo-kemiaĵoj (el la koton, aŭ el la fabrikado)
- Malpermesi kontraŭ-alkokreskadan tegaĵon por ŝipoj, enhavante stanon (TBT=Tri-butil-stano).

REACH: Postulo de la EU-Komisiono (Registrado, Evaluado, Rajtigo de Kemiaĵoj) laŭgrade de ilia produktokvanto.

Kion Faras / EU ? REACH

Hiltrud Breyer (2007-07) pri kemiaĵoj en la ĉirkauaĵo:
Ni bezonas fortan dekretan en la EU pri la Registrado, Evaluado, Rajtigo de Kemiaĵoj (REACH). La analizo de mia sango farita de WWF montris:
Malgraŭ respondeca nutrado ni akumulas ne-naturajn kemiaĵojn en la sango.
Ili troviĝas ĉie. En la lavpulvoro, vestaĵo, mebloj, komputilo.
Ni povas protekti nin nur limigite. Kelkaj el ili restas dum la tuta vivo en la korpo. Kiel patrino mi mamnutris miajn infanojn, ĉar tio estas la plej bona nutrado por beboj. Sed tiamaniere mi transdonis al ili sano-riskon.
Pro tio ni forte postulas dekretan pri la produktado kaj surmerkato de kemiaĵoj, kiu protektas la homon kaj la naturon kontraŭ danĝeroj.
Kemiaĵoj devas esti kontrolitaj rilate iliaj riskoj kaj oni ne rajtas porti ilin en la merkaton se ili montriĝas san-danĝeraj kaj aparte kiam ili estas persistaj.
(laŭ teksto de H. Breyer (2007-07) pri la EU-dekreto REACH)
Ĝi estas decidita 2007-06, sed ne sufiĉe forte protektas la homojn.
Ret-paĝo: hiltrud.breyer.eu

Kion Faru la Ŝtatoj / la EU?

Tutmonda limigoj por fiŝkaptistoj (laŭ specio, kvanto kaj iloj, malpermesi la detruon de la margrundo, kromkaptado, kaj detruo de marbordaj mangrov-aroj).

- Informi la konsumantojn (ne manĝi endanĝerigitajn speciojn, aŭ kies kaptado estas medio-malafabla).
- Limigi la permeson de en-maraj fiŝo-bredejoj, kaj uzadon de medikamentoj, k.a. kemiaĵoj.
- Malpermesi la produktadon de GM-fiŝoj, ĉar ili ne plu estas kontroleblaj se metitaj en la maron.

Kion Faru la Ŝtato ? Agrikulturo


Subteni agrikulturon ne laŭ la amaso sed por bonkvalito kaj por medio-afabla mastrumado:
prekondiĉo por bona kvalito de ĉiuj akvaroj.

Malpermesi kemiaĵojn (pesticidojn, herbicidojn) kiuj estas persistentaj kaj tiel akumuliĝas en la graso de homo kaj bestoj – ili ofte agas kiel kseno-hormonoj. Prefere uzi organikajn fekundenczojn – (sed ne troe).

Apliki kemiaĵojn al la bestonutrado por plirapidigi la kreskadon ankaŭ estas besto-torturo; same kiel la mal-konvena tenado aŭ transporto de bruto-bestoj.

Persist(ant)a: preskaŭ ne malkomponebla en natura ĉirkaŭaĵo.
Kseno-hormono: artefarita substanco kiu agas kiel hormono.
-enz-: sufikso, simile al – il-, sed por kemiaĵoj, k.s..

Elkoran dankon por via intereso
kaj medioafabla viv-maniero !



(foto) Internacia Komisiono por protekti la Danubo Riveron: icpdr.org